## ILEI INVITAS VIN AL KONFERENCO EN AFRIKO!

**UNUA ALIĜPERIODO ESTAS PLILONGIGITA ĜIS LA 20-A DE APRILO !**

***Jen unika ebleco konatiĝi kaj aktive esperantumi kun afrikaj samideanoj:***

# La 41-a Konferenco de ILEI en Portonovo (Benino) 29 julio-5 aŭgusto 2008

***ILEI-Konferenco en Afriko* – Kial?**

***Ĉar:***

- **E-agado** en Afriko bezonas sian ILEI-dimension:
— ***en Afriko*** estas multaj lernemuloj kaj malmultaj E-instruistoj
— ***instrukapabligado*** estas prioritata tasko de ILEI
- **E-instruistoj** de Afriko deziras pli komuniki kun kolegoj por:
— ***spertiĝi*** pri ILEI kaj lerni el ĝia historio
— ***perfektigi*** siajn lingvokapablojn kaj spertiĝi pri didaktiko
— ***plikonatiĝ***i kun instrumaterialoj, helpiloj kaj metodoj por E-instruado
- **Afrika E-ujo** povas oferti al tutmonda E-movado multon, sed:
— ***vojaĝoj*** al E-aranĝoj en aliaj mondopartoj estas tro kostaj por ili
— ***malmultaj*** vojaĝoj per helpo de amikoj de Afriko ne suficas

## Afriko de proksime — ĝia kulturo malfermiĝos tuj antaŭ Viaj okuloj!

## *Instruistoj de Esperanto por la Planedo Tero*

ILEI-konferenco en Afriko estos grava evento por la E-movado entute, por la historio de ILEI kaj por la E-movado en Afriko. Partoprenu la konferencon por kuraĝigi la samideanojn en Afriko kaj omaĝi iliajn klopodojn por disvastigado de E-o en la tuta mondo.
Instruista trejnado en Afriko estas prioritata tasko por ILEI. Grava paŝo de tiu agado estis la trejnseminario en 2007 samloke, kie okazos la konferenco. Ankaŭ per tio ILEI subtenis la klerigadon de afrikaj gekolegoj, kiuj havas malmultajn eblecojn partopreni internaciajn renkontiĝojn, rekte kontaktiĝi kun gekolegoj, interŝanĝi spertojn pri metodiko, didaktiko de Esperanto-instruado.
En la 41-a sia konferenco ILEI proprakoste financos partoprenon de 20 afrkaj samideanoj por ilia pluklerigado. **Financa helpo por subvencii partoprenon de kiom eble pli da instruistoj kaj instrukapabligadon de junaj instruemuloj el Afriko bonvenos al la konto ilek-a de ILEI ĉe UEA, aŭ al Afrika Fondaĵo de UEA, ĉiam kun indiko "Benino 2008".**

**Venu al la konferenco, ke ni kune serĉu la respondojn!**
**Vidu fotojn el nia konferenclando kaj filmitajn invitojn en**: http://www.ilei.info/novajxoj/benino.php

**Informoj** pri la konferenco, programo, urbo, partoprenkondiĉoj en http://www.ilei.info/novajxoj/Portonovo.php

**Reta aliĝilo** en http://ilei.info/konferenco/alighilo2008.php

**Se vi havas demandojn** proponojn aŭ komentojn — Vi ĉiam estas bonvena skribi al: Aida Čižikaitė (ILEI-estrarano pri konferencoj) aidute@mail.lt kaj Charles Alofa (loka ĉeforganizanto) alofkarlo@yahoo.fr.

# BONVENON!